



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 2/2016 (207)

15. 6. 2016



*Geedzoj Roubicek renkontis sian konaton en Venecio:
„Kion ili faras ĉi tie, sinjoro Kohn?” demandas Roubicek.
„Mi estas ĉi tie en geedziĝa vojaĝo.”
„Kaj kie ili havas sian edzinon?”
„Kie ŝi estu? Ŝi estas hejme. Ja iu devas resti en la vendejo.”*

Ilustraĵo: Pavel Rak

*>>> Aliaj judaj
anekdotoj ekde la
paĝo 3*

EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj	2
Judaj anekdotoj	3
Triumfo de <i>famiglio</i> Corleone	6
Fuĝinto en Sankta Lucio	9
Kial ni ne ŝatas laboron	14
Avantaĝoj de fromaĝo kiel veturkunulo	16
Labirinto ĉe Hampton Court	18
For la viandon!	20

Klub esperantistů v Praze

<http://bulteno.cs-retromusic.net>

Schůzky v ul. Ve Smečkách 25
ve vybrané čtvrtky od 17 do 19 h.

Bulteno

redaktor: Tomáš Břicháček

t.brichacek@seznam.cz

Lingvaj korektoj: Pavol Petřík kaj
Markus Beyer.

AKTUALAĴOJ

Pasintaj aranĝoj kaj okanzintaĵoj

24/03/2016 – prezentado de Tomáš Břicháček pri „gravitaj montetoj“ (*kunvenejo*)

21/04/2016 – prelego de Jiří Galuška pri lia vojaĝado kun Esperanto en Ĉilio (*kunvenejo*)

23/04/2016 – aktualigitaj la indikoj pri nia klubo en la registro de asocioj

05/05/2016 – prelego de Petr Chrdle pri la reformacio en Ĉeĥio (*kunvenejo*)

21-22/05/2016 – SELE (Semajnfina lernado) – E-mentala socia kaj eduka aranĝo – en Chocerady

02/06/2016 – prezentado de Vlasta Piščíková pri Sicilio (*kunvenejo*)

Majo kaj junio – okazis denove la agado „Traduka printempo“: volontuloj havis okazon traduki interesajn literaturajn tekstojn por la somera Bulteno

Zápis aktuálních údajů o klubu do rejstříku spolků

23. dubna 2016 byl aktualizován záznam o našem klubu v rejstříku spolků. Byly zaneseny nové údaje – zejména název, sídlo a statutární orgán. Dostali jsme tak požadavkům nového občanského zákoníku a dalších předpisů. Výpisem z rejstříku se nyní budeme moci prokazovat při právních jednáních s třetími osobami.

Venontaj aranĝoj

06/06/2016 – 6-a E-mentala pikniko – en Bad Schandau

15/06/2016 – Helpu helpi 2016

24-26/06/2016 – Viando – E-mentala gastronomia aranĝo – en Chotýčany

15-17/07/2016 – Praga somero

13/08/2016 – 7-a E-mentala pikniko – en Krásná Lípa

07-09/10/2016 – 10-a BIERo (Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo) – en Turnov

> Detaloj en: <http://www.e-mental.cz/> kaj <http://bulteno.cs-retromusic.net>.

Kunvenoj ekde septembro

Datoj: 8.9., 22.9., 6.10., 20.10., 3.11., 1.12., 15.12. Kunvenoj komenciĝas je la 17-a horo. Ilia programo estos prezentita en niaj interretaj paĝoj.

Helpu helpi 2016

Venu kun ni jam la trian fojon subteni menshandikapulojn kaj samtempe fari reklamon por Esperanto! Pasintjare ni sukcesis havigi monon por 33 brikoj (antaŭpasintjare tio estis 21). Dank' al tio meze de Prago povis esti videblaj Esperantaj skribaĵoj de malproksime kaj de diversaj flankoj dum 100 tagoj. „Projekto BRIKO“ (ĉeĥe „Akce cihla“), ekzistas jam dek sep jarojn. Ĝi sukcese helpas al menshandikapuloj integriĝi, ĝi kreas por ili stud- kaj labortrejnadcentrojn. La subtenon eblas fari pere de aĉeto de briko(j), sur kiu(j) oni povas desegni aŭ skribi laŭplaĉe kaj poste la brikoj estas enmetitaj en simblan muron, kiu staras ĝuste en tre vigla parto de Prago, kie kaj enlandanoj kaj eksterlandaj turistoj multnombre promenadas. Kiam okazos la aranĝo? La 15-an de junio 2016 je la 18.30. Kunvenloko: Prago, Havířská 2 – antaŭ ludilvendejo Sparkys. Kion kunporti? Entuziasmon, ĝojon, kaj monon! Kaj eble ion por malgranda pikniko post la desegnado. Unu briko kostas 150 kronojn. (*Vlasta Piščíková*)

SOMERA LEGADO

Judaj anekdotoj

Juna Sara devenas de riĉa familio. Ŝi enamiĝis en malriĉan knabon kaj eĉ studenton. Ĉar la sinjoro bankisto tre ŝatas sian filinon, li ne volas malhelpi al ŝia feliĉo kaj li invitis la elektitan knabon por vizito.

Post tagmanĝo li demandis la koramikon:

„Pri kio vi okupiĝas, juna viro, kaj kiajn planojn vi havas por via vivo?”

„Mi studas,” venis simpla respondo.

„Kaj kion?”

„Filozofion kaj talmudon.”

„Tio estas bonega. Kaj per kio vi volas vivi, kiam vi ekhavigos familion?”

„Mi estas profunde kredanta kaj mi kredas, ke Dio prizorgos nin.”

„Bone kaj kion vi faros post la studoj? Kiel vi volas vivteni la infanojn?”

„Tion mi ankoraŭ ne scias, sed mi kredas, ke se mi dece kaj pie vivos, Dio certe ne lasos nin en problemoj.”

Kiam la junulo foriris, Sara alparolis la patron kaj demandis lin:

„Do kion vi diras pri li? Kiel li plaĉas al vi? Ĉu li ne estas perfekta?”

„Li estas,” ridetis la patro, „li estas la unua homo en la mondo, kiu vidas Dion en mi.”¹



Maljuna negocisto Taussig estas mortanta. La tuta familio staras ĉirkaŭ lia lito kaj la mortanto anhele diras: „Sara, mia edzino, ĉu vi estas ĉi tie?”

„Certe, Mojŝe, ne timu. Mi estas ĉi tie.”

„Kaj ĉu Arnoŝt, mia unuenaskita filo, estas ĉi tie ankaŭ?”

„Jes, paĉjo, mi estas ĉi tie.”

„Kaj Icik, mia malpli aĝa filo, ankaŭ?”

„Jes, paĉjo, ni ĉiuj estas ĉi tie.”

„Kaj kiu estas en la vendejo?!”²



Sinjinino Roubickova demandis sian konatulinon, sinjinon Kohnova, kiel fartas ŝiaj infanoj en siaj geedziĝoj.

„Tio estas duone. Moricek fartas tre malbone. Imagu, ke li edziĝis kun fiulino, kiu faras nenion, ŝi nur pigremas kaj li devas prizorgi ŝin, kuiri por ŝi, akompani ŝin al vespermanĝoj kaj senĉese li devas ion aĉeti por ŝi. Li estas simple mizerulo. Sed Etelka havas bonegan edzon. Li prizorgas ŝin de mateno ĝis vespero, li portas matenmanĝon por ŝi en la liton, ŝi povas ellitiĝi, kiam ŝi volas, ili estas senĉese en iu restoracio aŭ vinejo kaj li aĉetas por ŝi ĉion, kion ŝi deziras.”¹

Karakterizaĵo de la judoj, kiuj studis la Talmudon dum jaroj, estas ruza kaj akra pensmaniero. Jen ekzemplo:

Rabeno kaj pastro veturas en la rapidvojo, ĉiu per sia aŭto.

Okazas akcidento: ambaŭ aŭtomobiloj karambolis (koliziis) kaj preskaŭ plene detruigis. Sed la du Di-servantoj („Di-amantoj”) saviĝis. Ili eliras, staras kune ĉe la vojrandoj kaj trovas, ke nenio okazis al ili.

La rabeno rigardas la alian homon kaj diras: „Vi estas pastro, ĉu ne?”

„Jes”, respondas la pastro.

Rabeno: „Okazis al ni vera miraklo. Certe la Eternulo deziris, ke ni renkontiĝu kaj fariĝu amikoj”.

Pastro: „Povas esti”.

Rabeno: „Mi opinias, ke ni devas tosti pro nia saviĝo kaj je nia nova amikiĝo. Mi havas hazarde botelon da vino. Espereble ĝi ne estis detruita. Ĉu vi pretas drinki kun mi?”

Pastro: „Kial ne?”

La rabeno alportas el la veturila kofro bonstatan vinbotelon kaj ofertas al la pastro. Tiu ĉi drinkas iomete, sed sekve de instigoj de la rabeno, li poste pli kaj pli drinkas. Sed la rabeno tute ne drinkas.

Pastro: „Kial vi ne drinkas ankaŭ?”

Rabeno: „Mi preferas unue atendi la policon.”³



Judo iris al koncerto en Varsovio (antaŭ la dua mondmilito) kaj sidiĝis apud gojo.

Unue aperis kantisto, kiu belege prezentis operajn ariojn kaj ricevis multajn aplaŭdojn. Tiam flustris fiere la judo al sia najbaro: „Li estas unu el ni!”

Poste okazis mirinda prezento de violonisto. Ankaŭ li ricevis multege da aplaŭdoj. Diris tiam la judo al la gojo kun ĝojo: „Ankaŭ li estas unu el ni”.

Sekvis fascina kantistino, kiu sukcesis vibrigi la korojn de la spektantoj. Tiam reagis la ĝojplena judo: „Jen denove juda!”

Finfine la pola najbaro perdis sian paciencon kaj murmuris: „Ho, Jesuo Kristo!”

Sed tiam tuj reagis la judo: „Ankaŭ li estis unu el ni...”³



Rabeno estis malkontenta, ke homoj ofte eniras sinagogon sen kapkovrilo. Unu tagon li metis apud la pordo afiŝon: „*Eniri sinagogon sen kovrita kapo estas kiel fari adultron.*”

Post du tagoj iu alskribis: „*Mi provis ambaŭ kaj ne indas kompari!*”²



„Do kion diris via fianĉo al nia Etelka?” demandis la riĉa sinjoro Stein al la svatisto.

La svatisto ridetis kaj diris:

„Li proklamis, ke naturo malavare pridonacis vian filinon kaj li kredas, ke sinjoro bankisto ne lasos sin hontigi per tiu naturo.”¹

Kohn babilas kun Roubicek.

Roubicek: „Ĉu ili, Kohn, kredas je aŭguroj de kartistinoj?”

Kohn: „Nuntempe mi kredas je 50 procentoj.”

Roubicek: „Kiel mi devas kompreni tion?”

Kohn: „Simple. Antaŭ unu jaro mia Sara vizitis kartistinon kaj ŝi aŭguris, ke ene de unu jaro nia Etelka edziniĝos kaj ŝi naskos knabinecon.”

Roubicek: „Kaj?”

Kohn: „Do ŝi jam havas tiun knabinecon.”¹



Judo veturas en la centro de Jerusalemo kaj serĉas urĝe lokon por lasi sian aŭton. Li ĉirkaŭiras la centron longan tempon, sed senrezulte. Subite, fariĝinte preskaŭ senespera, li levas la vizaĝon ĉielen kaj diras: „Dio, se vi nun aranĝos por mi parkejon, mi promesas ekde nun observi la Sabaton, manĝi nur laŭ la ritoj de la religio („Koŝere”) kaj observadi la devojn dum ĉiuj judaj festoj”.

Tuj post kiam li finis la frazon, li vidas liberan lokon por lasi la aŭton. Ĝoje li tuj rigardas supren kaj diras: „Ne gravas jam, mi jam mem elturniĝis.”³



Sara Kohnova telefonas al loka ĵurnalo al ĉefo de rubriko de anoncoj: „Mi volus publikigi funebran anoncon.”

„Certe, sinjorino. Kiun tekston?”

„*David Kohn mortis.*”

„Kaj plu? Nenion? Nur *David Kohn mortis*? Ĉu vi scias, ke je la sama prezo vi rajtas havi cent literojn?”

„Vere?! Do antendu momenton... Jes, do la anonco tekstos: *David Kohn mortis. Mercedes 300 SL vendota. Rimarko: malmultekoste.*”²



Kohn renkontas Roubicek-on.

„Aŭskultu Roubicek, mi jam de longe volis demandi al ili, kia propradire estas ilia Sara en lito?” demandas Kohn.

„Mi fakte ne scias,” respondas Roubicek. „Iuj diras, ke bona, aliaj, ke malbona.”²



Tradukis Pavol Petřík (1 + la enkonduka el Venecio) kaj Tomáš Břicháček (2).
Aldonitaj kelkaj el Ipernity de Dieter Dungert (3).

Triumfo de *famiglio* Corleone *La Baptopatro*

Mario Puzo

Tessio atendis en la domo de la mortinta *Don* kaj kiam venis Hagen, li trinkis kafon en la kuirejo: „Mike jam atendas vin,“ sciigis Hagen, „voku al Barzini kaj diru al li, ke li ekveturu.“

Tessio leviĝis kaj iris al la telefonaparato sur la vando. Li vokis la numeron de la kontoro de Barzini en Novjorko kaj severe diris: „Ni ekveturas al Brooklyn“. Li redonis aparaton sur la vandon kaj ekridis al Hagen: „Mi esperas, ke Mike hodiaŭ vespere ĉion por ni bonfaros.“

„Pri tio mi certas,“ aldonis Hagen senŝerce. Li akompanis Tession el la kuirejo eksteren kaj iris kun li al la domo de Michael. Ĉe la pordo haltigis ilin unu el la gardantoj: „La ĉefo ordonas, ke li veturos per alia aŭto. Vi du veturu tuj.“

Tessio nubiĝis kaj turnis sin al Hagen: „Damne, tion li ne povas fari, tiel la interkonsento falaĉas!“

En la sama minuto alpaŝis aliaj tri gardantoj. Hagen parolis per modera voĉo: „Eĉ mi ne povas kun vi veturi, Tessio.“

Maldika *kaporegimo* tuj ĉion komprenis, sed toleris tion. Por sekundo preskaŭ faligis lin korpa malforto, sed rapide li revigliĝis kaj diris al Hagen: „Diru al Mike, ke mi ŝatis lin ĉiam, sed negoco estas negoco.“

Hagen kapjesis: „Tion li scias.“

Tessio tempeton silentis kaj poste demandis mallaŭte: „Ĉu vi povas helpi min? Rilate al niaj bonaj malnovaj tempoj?“

Hagen kapneis: „Ne, mi ne povas“, kaj rigardis Tession, kiel gardantoj gvidis lin al aŭto. Li sentis naŭzon. Tessio estis la plej bona soldato de *famiglio* Corleone. Maljuna *Don* kredis pri li pli, ol pri aliaj. Nur escepte de Luca Brasi. Kia damaĝo, ke la homo tiel inteligenta kaj tiel malfrue en la vivo faris fatalan misan pritakson.

Carlo Rizzi ankoraŭ atendis telefonvokon de Michael. La senĉesaj alveturoj kaj forveturoj de aŭtoj nervozigis lin. Ŝajnas, ke okazas io pli granda kaj lin oni lasis flanke. Senpacience li ektelefonis al Michael.

La aŭskultilon levis unu el la gardantoj, li foriris al Michael kaj revenis kun mesaĝo, ke Carlo atendu, ke li baldaŭ estas sur la vico.“

Do Carlo vokis amdonantinon kaj diris al ŝi, ke certe li invitos ŝin pli poste por vespermanĝo kaj ili pasigos kune la nokton. Michael diris, ke oni lin baldaŭ vokos, se temas pri ĉio ajn, certe pli longe ol du horojn tio ne daŭros. Per aŭto li atingos ŝin en Westbury ĝis kvardek minutoj. Li promesis al ŝi per dolĉaj vortetoj, ke li venos. Poste li volis surmeti purajn tolaĵojn, por ne perdi tempon poste. Ĝuste kiam li komencis surmeti ĉemizon, sonis pordfrapo. Li pensis, ke Michael provis lin atingi telefone, sed tiu estis okupita kaj pro tio Michael sendis por li iun persone. Li iris al la pordo kaj malfermis ĝin. En momento tra la tuta korpo traflugis lin horora frosta timo. En la pordo staris Michael Corleone mem simila al anĝelo de morto, same Carlo lin vidadis ofte en sonĝoj.

Malantaŭ li staris Hagen kaj Rocco Lampono. Ili mienis senĝoje, kiel homoj, portantaj malbonajn novaĵojn. Ĉiuj tri envenis la domon kaj Carlo gvidis ilin en

salonon. Li jam rekonsciiĝis el la ŝoko kaj riproĉis al si sian nervozecon. Sed la vortoj de Michael lin konsternis, li eksentis naŭzecon.

„Vi devas prirespondi pri Santino!“ diris Michael.

Carlo ne respondis, li ŝajnis malkomprenon. Hagen kaj Lampone staris flanke, Carlo kaj Michael kontraŭ si.

„Vi antaŭjetis Sonny-n al *famiglio de Barzini*,“ diris Michael per raŭka voĉo. „Ĉu vi pensis laŭ paroloj de Barzini, ke la komedion, kiun vi ludis kun mia fratino, mi glutos, mi Corleone?“

Carlo preskaŭ morta pro timo balbutis sen deco, sen digno: „Mi ĵuras, mi estas senkulpa, Mike, mi petas, faru al mi nenion.“

„Barzini estas morta,“ daŭrigis Michael trankvile, „Ankaŭ Phillip Tattaglia. Hodiaŭ vespere mi volas finkvitigi ĉiujn librotenojn. Vi ne diru, ke vi estas senkulpa. Pli bone por vi konfesi pri tio, kion vi faris.“

Hagen kaj Lampone surprize rigardis Michaelon. Videble, ke Michael ankoraŭ ne superis la nivelon de sia patro! Li ne provadus trudi tiun malfidelulon konfesi sian kulpon. Lia kulpo estas plene certigita, se tian kulpon oni povas pruvi. La respondo estis klara. Michael ne estas certa kun siaj rajtoj, ankoraŭ li antaŭzorgas, ke li ne estu maljusta, plu premas lin iom da necerteco, kiun povas nuligi nur konfeso de Carlo.

La respondo ne venadis. Michael preskaŭ afable admonis: „Ne estu timega. Ne pensu, ke mi farus de mia fratino vidvinon. Ĉu vi pensas, ke mi miajn bofilojn orfigus? Mi fariĝis por unu baptopatro! Ne, vi pro puno ne devas labori por *famiglio*. Mi sidigos vin en aviadilon al Las Vegas kaj mi deziras, ke vi restu tie. Mi sendados al Connie monon. Tio estas ĉio. Sed vi ne rajtas diri, ke vi estas senkulpa. Ne ofendu mian inteligentecon kaj ne kreu mian furiozon! Nu, kiu ligis al vi la kontakton, Tattaglia aŭ Barzini?“

En malespera espero, ke li eble savus sian vivon, ke li lin ne mortigos, Carlo flustris: „Barzini.“

„Bone, bone,“ konsolis lin Michael. Per la dekstra mano li gestis: „Nun vi devas forvojaĝi. Ekstere atendas aŭto kaj veturigos vin al la flughaveno.“

Carlo eliris la domon kiel la unua, tuj post li tri gardantoj. Jam noktiĝis, sed la rezidejo dronis en la lumegoj de reflektoroj kiel kutime. La aŭtomobilo atendis, estis la lia. La ŝoforon li ne rekonis. Iu sidis sur la malantaŭa seĝo. Lampone malfermis la pordon kaj gestis al Carlo enveni. Michael diris: „Mi telefonos al Connie, ke vi jam ekveturis al ŝi.“

Carlo sidiĝis. Lia ĉemizo estis malseka de ŝvito. La aŭto startis kaj rapide elveturis tra la pordego. Carlo volis turni la kapon kaj vidi pasaĝeron malantaŭ li, ĉu li konas lin. En tiu momento Clemenza metis al li trans kapo murdan ŝnuregon, lerte, elegante, same kiel faras knabineto al katido per silka rubando. Li abrupte ektenis, glata ŝnuro ĉirkaŭis la kolon de Carlo, lia korpo eksaltetis kiel fiŝo sur fiŝhoko kaj Clemenza firme tenis kaj tiris pli ĝis la korpo ĉesis kontraŭi. En la veturilo ekestis malagrabra odoro - la morto malplenigis la urinvezikon kaj intestojn. Clemenza ankoraŭ kelkajn minutojn tenis la ŝnuregon, poste volvis ĝin kaj metis en poŝon. Li komforte apogiĝis. La kadavro de Carlo

falis el la pordo de la aŭtomobilo. Post sekundo Clemenza malfermis la fenestron por forigi la malodoron.

La venko de la *famiglio* Corleone estis perfekta. Dum dudek kvar horoj Clemenza kaj Lampono sendis siajn taĉmentojn kontraŭ ĉiuj, kiuj penetris en la areoj de Corleone por severe ilin puni. Neri estis ordonita regi la taĉmenton de Tessio. La *bukmekro* de Barzini perdis vivtenon kaj du el la ĉefaj celalpeluloj estis murdpafitaj en momento, kiam en la restoracio en Mulberry Street ili trankvile vespermanĝis. La Corleonanoj ankaŭ mortigis konatan trompiston, specialiston pri trotkonkuroj, kiam li revenis el trotkonkurejo hejmen kun poŝoj plenaj de vetgajna mono. El la Novjorkaj doko malaperis la du plej konataj uzuristoj, oni trovis ilin post multaj monatoj en la marĉejoj en New Jersey.

Michael Corleone per tiu atako gajnis ĝeneralan reputacion kaj la *famiglio* de Corleone atingis denove eksterteritoriecon inter la novjorkaj *familioj*. Lian prestiĝon kaŭzis ne nur la taktiko, sed ankaŭ la fakto, ke plimulto de la plej gravaj ĉefoj de Tattaglianoj kaj Barzinianoj transiris al la flanko de Corleoneanoj.

Por Michael tio povus esti perfekta triumfo, se Connie ne histeriumus ege. Connie revenis hejmen kun la patrino, la infanojn ŝi lasis en Las Vegas. La vidvinan decon ŝi tenis ĝis la momento, kiam la aŭtomobilo envenis la rezidejon. Poste ŝi pli frue ol ŝia patrino ekkuris laŭ la ŝtona pavimo al la domo de Michael. Ŝi aplombis la pordon kaj trovis Michaelon kun Kay en la salono. Kay ekpaŝis al ŝi, ke ŝi konsolu kaj fratine brakumu ŝin, sed ŝi konsterniĝis, kiam Connie komencis kriaĉi al la frato, ĵetadis al li en la vizaĝon insultaĵojn kaj riproĉojn: „Vi kanajlo, bastardo, pedikulo, vi murdis mian edzon. Vi atendis la morton de nia patro, ke neniue haltigos vin kaj vi nun mortigis lin! Vi lin murdis! Vi kulpigis lin je mortigo de Sonny, ĉiam vi kulpigis lin, ĉiuj lin kulpigis. Sed vi pri mi ne pensis. Pri mi vi fajfis. Pri mi vi ne zorgis. Kion mi nun faros? Kion mi faros?“ Connie ekploris.

Du gardantoj stariĝis malantaŭ ŝi kaj atendis ordonon. Sed Michael staris sen movo kaj atendis la forpason de la fratina kolero.

Kay diris indigne: „Connie, vi estas emociita, ne diru tiajn aferojn.“

La atako de histeriumo de Connie forfalis. En ŝian parolon envenis murdeca malamo. Ŝi daŭrigis al Kay: „Kial vi pensas, ke li estis al mi tiel frosta? Kial vi pensas, ke li tenis Carlton en la rezidejo? La tutan tempon li kalkulis, ke li mian edzon mortigos. Kiam la patro vivis, li ne kuraĝis. La patro ne permesus al li tion. Li tion sciis. Do, li atentadis. Li eĉ baptopatris al nia infano, li nur mistifikis nin. Sensenta pedikulo! Kaj vi pensas, ke vi vere konas vian edzon? Ĉu vi scias, kiom da homoj li lasis komune kun mia Carlo mortigi? Jen, legu gazetojn. Barzini kaj Tattaglio kaj pluraj. Mia frato ordonis ilin murdi!“

Connie denove ekhisteriumis. Ŝi provis kraĉi al Michael en la vizaĝon, sed mankis al ŝi salivo.

„Forportu ŝin hejmen kaj voku kuraciston,“ ordonis Michael. La du gardantoj ŝin tuj kaptis je la brakoj kaj fortrenis ŝin el la domo.

Kay staris kiel sala kolono, plene terurigita. Ŝi demandis sian edzon: „Kial ŝi tiel parolis? Michael, kial ŝi pri tio kredas?“

Michael suprentiris la ŝultrojn: „Ŝi estas histeriulino.“

Kay rigardante al li en la okulojn: „Michael, diru, ke tio ne estas vero, mi petas vin, ĉu tio estas vero!“

Michael lace kapneis: „Certe ne. Vi povas kredi min. Mi permesas al vi demandi pri miaj aferoj kaj mi respondas al vi. Tio ne estas vero.“

Ankoraŭ neniam lia voĉo sonis tiel konvinke. Li ekrigardis al ŝi rekte en la okulojn. Por ke li konvinku ŝin, li prenis ĉiun reciprokan fidon, kiun dum la edzeco dum tempo ili kreis. Kaj ŝi ne plu povis dubi. Memriproĉe ŝi ekridetis al li, brakumis lin kaj ofertis siajn lipojn.

„Ni ambaŭ bezonas trinki,“ ŝi diris kaj eniris la kuirejon por alporti glacieron. En la kuirejo ŝi ekaŭdis la malfermon de la pordo. Ŝi eniris la koridoron kaj ekvidis la venantajn Clemenza, Neri kaj Rocco Lampone kun siaj gardantoj. Michael staris dorse al ŝi kaj Kay depaŝis flanke, ke ŝi vidu lian profilon. Clemenza salutis ŝian edzon kaj uzis la alparolon „Don Michael!“ Kay rigardis kiel Michael staras kaj akceptas la omaĝon. Li similis la statuojn de la romiaj imperiestroj, kiuj kun la rajtigo de la dioj praktikis povon pri vivo kaj morto de aliaj. Unu brakon li apogis sur la flanko, el la profilo de la vizaĝo videblis la malvarmo de arogema povo. Li staris komforte, leĝere, pieddise. La ĉefoj de la taĉmentoj staris antaŭ li. En tiu momento Kay ekkomprenis ĉion: pri kio lin riproĉis Connie, tio estis la vero. Ŝi reiris la kuirejon kaj ekploris.

El la libro *La Baptopatro*
Tradukis Jindřiška Drahotová.

Fuĝinto en Sankta Lucio *Morgaŭ eble ĉio estos alie*

Tomáš Břicháček

vendredo la 24-an de oktobro 2081, vespere

La apudmara feriocentro Soufrière sur la insulo Sankta Lucio iompostioe sinkis en unu el la vivĝojaj vendredaj vesperoj, kiuj transiras en pasian nokton. La restoracio Petit Peak en la haveno estis ĉirkaŭ la dudekunua horo plena de homoj kaj amuzo pulsas tie. Kelneroj kaj allogaj kelnerinoj portis kolororiĉajn bonodorajn manĝaĵojn, kreola bando ludis tradiciajn lokajn melodiojn kaj multaj gastoj laŭ ilia ritmo dancis en la pargeto.

Sur la teraso ĉe la tablo, el kiu bone videblis la maro, sidis belaspekta matura viro de eŭropa fiziognomio en blanka vesto. Antaŭ si li havis botelon da ruĝa vino kaj lia vizaĝesprimo estis malstreĉita. La resonoj de sunsubiro super la maro, konturoj de pinthavaj montetoj ĉirkaŭ la urbeto, palmoj, varmega tropika aero, bruo de ondoj, muziko, belegaj virinoj, kaj antaŭ ĉio la fakto, ke ĉi tie li ne estis celebrulo kaj ĉasbesto de la amaskomunikiloj – ĉio tio plenigis lin per sento de perfekta kontento kaj bonhumoro.

La eksa prominenta ĉeĥa politikisto Sebastián Pokorný estis en libervola ekzilo en Karibio jam kvin monatojn. Ankoraŭ li ne povis satiĝi de la agrabla kaj senzorga vivo plena je korpaj ĝojoj. Kia mirinda faciligo ne havi ĉiam malantaŭ si tiujn ĵurnalistajn hienojn, li diris al si. Kaj ĉefe kiel brile estas troviĝi milojn

da kilometroj de ĉiuj tiuj „amikoj“, kun kiuj ligis lin variaj historietoj, kaj kiuj ŝatus vidi lin mentonosupren. Vere, lasttempe la situacio en Ĉeĥio komencis komplikiĝi por li.

„*Life is good. Life is so good!*“ murmuris por si mem la eksministro kaj nuna „negocisto kaj rentulo“ rigardante la maron kun delikata kalifornia vino sur lango. Hodiaŭ kiel kutime li ĝuos gigantan sangolikan stekon, salaton el maraj fruktoj, li fumos unu dikan kuban cigaron kaj kiel deserto li prenos unu aŭ du glasojn da la elstara rumo *Chairman's Reserve* de loka deveno. Poste li plukos dum danco aŭ ĉe la baro iun lokan belulinon – negrulinon aŭ mulatinon, kun kiu li pasigos la nokton en sia vilao. Vere, kiel alloga riĉa eŭropano li ĉi tie ne havis mankon de virinoj. Ankaŭ nun li sentis, ke li estis celo de la avidaj rigardoj de iuj ĉeestantaj damoj. Li al kutimiĝis al tio kaj estis memkompreneblaĵo por li. – Dum ĉiuj tiuj ludoj de okuloj li ne rimarkis, ke liadirekten diversfoje atente rigardis ankaŭ unu viro. Aziano kun griziĝanta nigra hararo kaj kun malhelaj okulvitroj, kiu ŝajnis esti riĉa ĉina turisto, sidis iomdistance kaj malrapide manĝis spadofiŝon. Se Pokorný rimarkus lin, li iĝus ege malpli trankvila. Tial li plue neĝenite meditis. – Kaj kiaj estas inoj! Volupto, pasio, natureco, obeemo... Ĝuste tion li ŝatis. Kiam li nur ekrememoras tiujn glaciajn vipurojn *tie*, agrablaj kiel elektra barilo. „Paradiza ter’...“ laŭdire! li murmuris kaj sputetis. Kompare kun la idilio, kiun li estis travivanta en Sankta Lucio: ridinde!

Kvankam la eksministro Pokorný estis feliĉa, ke li troviĝis en la alia fino de terglobo, okazadon en Ĉeĥio li sekvis ĉiutage. Finfine la plimulto de liaj diversspecaj komercaj agadoj havis ĉiam sian esencon ĝuste tie. Al liaj bankokontoj en Singaporo, Malajzio kaj Sudafriko alfluis el la respubliko ĉiumonate milionoj da kronoj – lumono el liaj multnombraj nmoveblaĵoj, dividendoj aŭ profitoj el silentaj komunumoj, sed ankaŭ postigitaj pagoj por amikaj servoj dum lia funkciado kiel ministro, lobiado, liveritaj informoj aŭ rekompencoj por ne sciigi iujn trovojn al malkompetentaj oreloj. Obskurajn negocojn en sia malnova patrolando li tamen intencis baldaŭ haltigi kaj startigi en Karibio principe laŭleĝan biznison. En kvindek kvar jaroj ja decis malrapidiĝi kaj transiri al malpli riska laboro. Restis fermi kelkajn „dosierojn“, kiuj devis helpi kompletigi la necesan komencan kapitalon.

Pokorný preparis egajn investaĵojn en branĉo de turisma trafiko kaj estigon de privata detektivejo. Por la unua ideo sufiĉis havi kapitalon kaj iomete da talento por negocoj kaj mono alfluos aŭtomate; Malgrandaj Antiloj estis finfine tre ŝatata turista celo. La administrado de detektivejo estas certe pli granda intelekta voko kaj ĝuste tiun laboron li antaŭĝojis plej multe. Serĉado, analizo kaj utiligo de informoj estis ja lia forta kapablo kaj pasio. Braveco en tiu branĉo kune kun alta inteligenteco kaj rapida menso kreis bazon de liaj porvivaj sukcesoj. Dank’ al tiu talento li iĝis precipe preferata kunlaboranto de la ĉefministro Oktábec. Kiam li fine *devis* direktigi ĝin kontraŭ sia longjara patrono, ĝi sekurigis al li ankaŭ luksan translokigon al karibia paradizo.

Pokorný malfermis komunikilon volante antaŭ manĝo ankoraŭ legi aktualaĵojn. Titolpaĝo de la ĵurnalo *Super* aperis fulme. La vizaĝo de la eksministro tuj subfleksiĝis pro hido. En granda fotografaĵo gramacaĉis Laura Janda Špondrová,

prezidantino de Alianco Progress, ambiciema opozicia bloko, kiu unuigis socialistojn, komunistojn, verdulojn kaj aliajn maldekstrajn aglomeraĵojn. Mallonga hararo kiel knabo, pikemaj porkaj okuletoj kaj sur ili angulaj okulvitroj, kutima ruĝa pantalona tajlorkostumo – jen la esperiga juna politikistino, kiun la amaskomunikiloj konkorde antaŭvidis kiel venontan ĉefministrinon.

„*Ovacioj halte por la unua damo de la opozicio!*“ legis Pokorný titolon kaj skuis la kapon. Li malfermis la artikolon kaj rapidrigarde legis. Rezultis el ĝi, ke la juna politikistino kun sia parolo en la aŭlo de la Filozofia fakultato fascinis studentojn. Egale estis evidente, ke la ĵurnalo malkaŝe favoras ŝin kaj enflatiĝas al ŝi fervore. Eksa juna, eble nur iom radikala, reprezentantino de la verduloj, laŭdire en siaj ne plenaj kvardek jaroj maturiĝis kiel bona vino kaj kapablas agi kiel unuigantino de la opozicio. Laŭ la ĵurnalo oni fine povas esperi je ŝanĝo, je alterno de koruptita garnituro, je starto de necesaj sociaj reformoj, ĝisatingi la evoluantan mondon; jam estas tempo, por ke iu skizu allogan vizion de la politika maldekstro por la 22-a jarcento, kiu scipovas alparoli junajn homojn.

Eksministro kun malrespektema grimaco fingrofrapis la datumvidigilon. Hm, hm! Do laŭ Laura maljunaj grandkapuloj makulitaj de multaj skandaloj kaj malvolontaj al reformoj devas iri for kaj iuj direkte malantaŭ kradojn. – Do, vidu, jen ĝi estas! En rifuĝo en Sankta Lucio li povas pri tio satridi. – Kaj kion plu oni havas ĉi tie? Nova registaro kunportos freŝan venton kaj nuligos malfruiĝon post okcidenta Eŭropo en sociaj tendoj. Ĉeĥio ne povas permesi al si havi 12 procentojn da civitanoj sen altlerneja titolo! Tiun bedaŭrindan nombron necesas redukti sub 5 procentoj. Necesas faciligi postulojn al studentoj tiel, ke ili ne impedu aliron al edukado. – Nu, certe, oni donu titolon jam pro frekventado, aŭ prefere al ĉiuj aliĝintoj. – Necesas progresi en la batalo por vera egaleco de virinoj kaj viroj! La ŝtato ekzemple devas laŭleĝigi egalan disdividon de hejmaj laboroj kaj de infanzorgado kaj malpermesi reakcian edukadon de infanoj laŭ la putraj *genderaj* stereotipoj. Ĉion tion la publika potenco devas senkompromise devigi ĉiarimede inkluzive de kriminala juro kaj forigo de infanoj el problemaj familioj! Necesas malpermesi malkonvenan literaturon, filmojn, reklamojn ktp., kiuj daŭrigas *genderajn* stereotipojn. – Jes, jes, estos *gendera* eldorado! – La ŝtato same ne devas toleri edukadon al seksa prudeco. Edukado de infanoj estas publika afero; ĉefrolon devas havi la ŝtato, ne gepatroj! Necesas, ke infanoj konsciiĝu naturdonon de seksualeco jam en antaŭlerneja aĝo, sed ĉefe, ke ili ellernu percepti ĝin sen *genderaj* desegnoj, moralaj antaŭjuĝoj kaj ke ili mem povu elekti seksan orientiĝon, kiu plej bone plaĉas al ili! Ni devas rajtegaligi la lastajn ĉikanitajn seksajn minoritatojn. Necesas komenci malferman diskuton pri la rajtoj de pedofiloj, zoofiloj, nekrofiloj kaj aliaj. – Tio estos amuze! Oni povus alporti tiujn pedofilojn al infanoj rekte al seksa edukado, por ke ili povu provi tion kun ili. – Necesas elimini reziduojn de favorado kaj propagado de kristana ideologio de la ŝtato. Ne konvenas havi Paskon kaj Kristnaskon inter la ŝtatfestoj kaj en publika televido. – Nu, certe. Prefere ramadanon! – Necesas mobilizi kriminalan juron kontraŭ tiuj, kiuj ne apartigas rubaĵon, malŝparas nutraĵojn, akvon kaj elektron ktp. Urgas modernigi

la ĉeĥan lingvon. Ni devas kompletigi strebon je *gendera* korekteco de la lingvo. Ni devas internaciigi la vortprovizon – ne eblas konservi en la lingvo tiom da slavaj kaj lokaj arĥaismoj, kiam ekzistas tiom da etablitaj internaciaj vortoj, kaj ni ankaŭ devas plue faciligi la ortografion. Necesas fine strikte malpermesi dubladon. Necesas malfermi diskuton pri la nomoj de publikaj spacoj kaj pri la estonteco de malnovaj monumentoj. Estas neelteneble, ke plue ĉie hantu la nomoj de patriarĥalaj uloj el ekstrema pasinteco, kiujn eĉ hodiaŭ preskaŭ neniu konas! Alinomigi! Novaj nomoj devus reflekti novajn politikajn prioritatojn, *genderan* ekvilibron. Konvenus elimini tro lokajn elementojn favore al internaciaj aŭtoritatoj kaj valoroj. Statuoj de iamaj nacionalistoj, etburĝoj kaj reakciuloj devus veturi rapide al lapidarion ...

Pokorný flankenmetis la komunikilon kun nefinlegita artikolo, prenis decan gluton da vino kaj sopirĝemis. Jam sufiĉas, li ne difektos sian manĝavidon. „Vere, tiu lando celas rekte al la pugo!“ li murmuretis. Disĉiploj de tiuj, kiuj iam ruinigis ĝin, jam denove levas la kapon kaj baldaŭ transprenos ŝipdirektilon. Bone, ke li frutempe malankris. Eĉ se li havus tute puran reputacion kaj ne atendus problemojn de la flanko de ŝtataj organoj kaj siaj komercaj amikoj, en tiu ŝtato ne atendus lin jam io bona. Dank’ al Dio, ke en tiu ĉi flanke lokita insulo la mondo estas ankoraŭ en ordo.

Kiam li vidas ĉiujn tiujn ruĝajn revoluciulojn, li preskaŭ havas konscienskrupulojn, ke li perfidis Oktábec-on, ja eĉ ĝuste kiam lia stelo estis falanta. Karel dum ĉiuj tiuj jaroj protektadis lin kaj malfermadis ambaŭ okulojn antaŭ liaj negocajoj kaj ekscesoj. Kiam antaŭ la lasta balotado la reputacio de Pokorný jam estis neeltenebla, Oktábec ofertis al li inteligentan miksaĵon de kontraŭvaloroj, por ke li ne kandidatiĝu kaj retiru sin el la politiko. Jes, ankaŭ dank’ al tiu kompenspago li establiĝis kiel sukcesa entreprenisto.

Ĉu li do devis montri pli da lojaleco? Ne tiel ĉi! Pokorný opiniis, ke li longtempe al sia patrono donis ekscelentajn servojn – kaj kiel superaveraĝa manaĝisto de konfiditaj ministraj resortoj, kaj kiel neoficiala informisto, kiu scipovis akiri informojn kaj utiligi ilian forton favore al la registaro kontraŭ ĉiuj adversuloj en politika, amaskomunikila aŭ ĝenerale publika sfero. Jes, li faris por la eksa ĉefministro kaj lia kliko tiom da malhonestaj laboroj! Servoj pagindas. Oktábec certe supozis, ke li ĉion malavare repagis. La problemo estis en tio, ke la eksa grandkapulo ne sciis, ke li ŝuldis multe pli. Jes, ankaŭ nedisvastigo de tiklaj informoj, kiuj povus en malbonaj manoj kaŭzi grandajn komplikaĵojn al lia longtempa klopodo, havas sian prezon.

Pokorný kutime baldaŭ eksciis, *de kie la vento blovas* (kiel diras ĉeĥoj), kaj scipovis kiel priruzi siajn objektojn de sia intereso. En la kazo de Oktábec li longe palpis kaj tio daŭris pli ol du balotperiodojn, antaŭ ol li trovis spuron en loko, kiun li antaŭe tiomfoje senrezulte esploris. *Programo de sistema alokado de labora forto*, mallonge PSALF – projekto de subteno al almigrado, kiu funkciis ekde la komenco de la registaroj de Oktábec kaj kiu alportis novan prosperon. Pokorný senĉese sekvis ĝin, sed neniam malkovris ion pli ol banalaĵojn. Komprenoble kutime okazis etaj aŭ eĉ pli grandaj kromlukroj en la flanko de tiuj, kiuj administris la projekton – koruptado, forigado de

nemoveblaĵoj el la fonduso, ktp. Nenio, kio ne okazu en aliaj landoj kun programoj de prisetlaj instigoj. Finfine Pokorný mem akiris avantaĝe plurajn nemoveblaĵojn. Nur post jaroj unu ŝajne sensignifa okazaĵo sugestis al li alian, fakte fascinigan starmanieron. Li sekvis tiun linion, ampleksigis siajn konojn kaj materialojn, kaj firmigis la impreson, ke li trafis kapitalan pecon de sia „informista“ kariero.


Pokorný lasis sian dosieron PSALF longe „en la tirkesto“ kaj trankvile plilarĝigis kaj perfektigis ĝin. Li intencis prezenti ĝin en la ĝusta momento, kiam ĝi havos la plej grandan prezon. Tio povus bone atendi ĝis la tempo ĉirkaŭ la balotado aŭ poste. Tamen fine li devis neplanite malkaŝi la kartojn pli frue jam ĉi-jare printempe, kiam li subite eksentis neceson rapide pakiĝi kaj kun sufiĉa kapitalo translokiĝi ien sufiĉe malproksimen. Vere, en siaj komercoj li iomete ŝvebigis tion kaj interplektiĝis kun tro abruptaj friponoj. Ekde tiam lia pulso ege rapidiĝas ĉiam, kiam li vidas iun ĉinon aŭ alian oblikvo-okululon. Tiuj bonŝance en Sankta Lucio raras.

Povrulo Karel, pripensis Pokorný. Li ne povis rememori homon, kiu scipovu pli bone regi siajn emociojn kaj ne montri sian internan etoson. Tamen kiam printempe Pokorný metis sian atuton, la eksa ĉefministro unufoje videble perdis la parolkapablon. Pokorný kvazaŭ bedaŭris lin.

Kaj nun li perfidu sian patronon duan fojon kaj ofertu siajn informojn al la nova garnituro? – Nu, kio? Kial tiu sentimentaleco? Kiam la tuta lando kaj sistemo kuras al la infero, ĉiu devas zorgi antaŭ ĉio pri sia propra estonteco. Do, *sorry*, Karel, *sorry*! Kiel diradis la patro: „Neniam lasu vian politikan idearon detrui vian biznison, vi stultulo!“ Pura vero. Do kio? Certe ili estas marksistaj kanajloj, sed se ili bone pagos... Ne gravas se iu estas bolŝeviko, faŝistaĉo aŭ mohamedano, kiam li faras bonan ofertan. Pokorný levis glason direktan al sia komunikilo, kie ankoraŭ brilis la artikolo pri la esperiga politikistino. „Do, ni eble interkonsentos, vi ruĝa lindulino. Kiu scias?“

En tiu momento bela nigra kelnerino alportis lian bifstekon. Vidante la riĉan teleron Pokorný beate ridetis, manbatetis la nigrulinon sur la postaĵo kaj donis al ŝi orientkaribian kvindolaran bankbileton.

La azia ĝentilhomo levis la kapon de sia fiŝo. Kiam li vidis, kiel la eŭropano en la blanka vesto avide ĵetas sin al sia vespermanĝo, liaj lipanguletoj softo larĝiĝis kreante frostan rideton. Li rigardis sian horloĝon, klavis mesaĝon en sia komunikilo, forsendis ĝin, kaj denove dediĉis sin al sia telero.



El la daŭrigota romano *Morgaŭ eble ĉio estos alie*, ĉapitro 2, sceno 3
<https://zitravsejinak.wordpress.com/> Tradukis la aŭtoro.

Kial ni ne ŝatas laboron

Václav Cílek

Unu aŭ du fojojn jare mi prelegas pri la nuntempa ŝanĝado de la mondo al laborgvidantoj kaj dungoficistoj de grandaj firmaoj. Tre ofte mi aŭdas ĝemon, ke homoj ne emas labori, sed emas esti dungitaj. Tio signifas, ke ili ŝparas sian energion en la laborejo, laboras sen iniciato kaj atendas la finon de sia labortempo. Ankaŭ sociologiaj esploroj montras, ke nur malmulte da homoj scipovas identiĝi kun la firmao kaj doni al ĝi la plej indan strebon. Kial jes, ĉu? Malgraŭ tio, firmaoj historie fidis je entuziasmuloj, kiujn ni povas vidi en malnovaj amerikaj kaj ĉeĥaj filmoj. Ili bezonas kreemajn homojn, kiuj alportos ideojn por la firmaoj kaj kreemon, kiujn ni konas el ne antaŭlonga tempo – kiel ekzemple fondintojn de malgrandaj komputilfirmaoj, kiuj transformiĝis al mondgigantoj.

Parto de la eŭropa konkurebleco kaj konduko de la resto de la mondo eblis pro la ekzisto de kreemaj, tenacaj stranguloj kaj laboremaj hobiuloj. Kie troviĝas tiaj homoj? Ĉu ili en la estonteco estos almenaŭ tiom multaj, ke ni konservu almenaŭ parton de la malaperanta mondpozicio aŭ almenaŭ iom da eŭropa fiereco?

Tony Schwartz el la firmao Energy Project kune kun Christine Porath el la universitato MC-Donough School of Business el Georgetown surbaze de studo de Gallup Instituto pritraktas la situacion je la labormerkato kaj diras, ke la situacio estos eĉ pli malfavora. Eĉ se vi laboras en konstanta posteno, tio ne estas kialo por ĝoji. Vi devas matene ekstarti, transporti vin longdistance al la laborejo, kie vi apenaŭ estas aprezata. En laborejo ne facilas fini taskojn, kiujn vi volis dumtage fini, ĉar daŭre vi estas ĝenata de iuj malgravaj aferoj kaj mesaĝoj. La ĉeĥa paleontologo Radek Mikuláš tion priskribis per la vortoj: „Mi havas tiom da laboro, ke dum la tago mi preskaŭ nenion sukcesos fari.“ Homoj post laboro kun sento de malpleno revenas hejmen, respondos elektronikan poŝton, rigardos retejojn kaj ekdormos. Pli malpli kompreneble ili la venontan tagon ne kuras al laborejo kun granda entuziasmo.

Similan sperton havas ne nur la meztavolo de oficistoj kaj uloj je komputiloj, sed des pli multe da superaj gvidantoj. Ili tre ofte sentas, ke ili volus fari ion eksterordinaran, sed sub la premo de svarmantaj etaj taskoj ili neniam havus tempon por tio. Shrinivisan S. Pillay de Harvard Medical School studis hazardprovaĵon de 72 pli aĝajn laborgvidantoj kaj eksciis, ke preskaŭ ĉiuj menciis iujn, eĉ tre seriozajn, simptomojn de psika forbrulo. Ĉiu el ili konis almenaŭ unu kolegon de sia ĉirkaŭaĵo, kiu psike forbruliĝis.

En Usono sentas fortan labormotivon nur 30% da homoj, sed mondscale la situacio estas eĉ malpli favora. Dum vasta esploro de laborantaj homoj el 142 landoj montriĝis, ke plene forte kaj psike kontente laboras nur 13% da homoj. Por la plejmulto de ni estas laboro laciga sperto.

La aŭtoroj de la menciita esploro supozas, ke la plej granda voranto de tempo kaj homenergio estas la elektronikaj amaskomunikiloj, kiuj inundas nin per informoj kaj postuloj. La aŭtoroj konektis sin kun plua organizo – Harvard

Business Review – kaj kune prilaboris la rezultojn de la demandesploro inter 23000 laboristoj el diversaj institutoj. La rezultoj estis tre similaj.

La dungitoj estus en la laborejo multe pli kontentaj, se estus plenumitaj kvar kondiĉoj:

- eblo dum laboro fizike ripozi kaj tiel akiri energion,
- emocia pritakso (aprezo por farita laboro),
- eblo koncentriĝi nur je la plej grava tasko kaj nur post ĝia plenumo dediĉi tempon al malpli gravaj taskoj,
- spirita pleniĝo – homoj laboris multe pli bone, se ili pensis, ke ilia laboro servas al iu pli signifoplena celo, ekzemple helpo al aliaj homoj.

Ne estas surprizo, ke firmao provis plenumi tiujn kvar postulojn, kiujn ni povas pritaksi kiel fizika, emocia, mensa kaj spirita subteno, la dungitoj estis pli kontentaj kaj pli lojalaj. Eĉ se estis plenumita nur unu el tiuj ĉi kvar postuloj, la laborstremado kaj kontento rimarkeble pligrandiĝis. Komprenoble, la plej bonaj rezultoj estis akiritaj, se estis plenumitaj ĉiuj kvar kondiĉoj. El la longa perspektivo evidentiĝis, ke la laborstrememo helpis la potencon de la tuta firmao. En la angla lingvo la aŭtoroj parolis pri „engagement,“ kiu havas ne nur unu signifon – psika subteno, koncentriĝo, emo kaj ideo, ke homo estas tio, kion li faras.

En la jaro 2012 La Gallup Instituto faris superan analizon – analizon de la antaŭaj analizoj (entute temis pri 263 antaŭaj studoj en 192 firmaoj). Kiam oni komparis la supran kaj la malsupran kvaronon de la firmaoj, evidentiĝis, ke en „kontentaj“ firmaoj estis enspezoj je 22% pli grandaj, pritakso de firmaoj flanke de la klientoj je 10% pli alta, je unu triono malaltiĝis ŝtelado kaj eĉ je 48% malaltiĝis laborakcidentoj.

Per tiu supra analizo, kiu inkluzivas la konduton de multe da dungitoj oni montris, ke gravas kiel homoj sentas sin dum laboro, ĉar tio funde influas la rezultojn de ilia laboro. Per intuicio ĉiu tre bone komprenas tion, sed per analizo tio estis pruvita statistike per „nombroj“.

Foje sufiĉas por pliboniĝo eĉ ne multe – ekz. ebligi al la homoj post ĉiuj 90 minutoj iom ripozi - tial ili ne intencis forlasi la firmaon. Relative grandajn problemojn havas tiuj homoj, kiuj intensive laboras pli ol 40 horojn semajne. Ŝajnas, ke okhora laborotempo konformas homnaturon kaj ke daŭre pli longa intensa laboro detruas senton de kontento kaj psikan kaj fizikan sanon. Se la estro aprezas kaj subtenas siajn subulojn, la laborpotenco pliboniĝas je 67% da subuloj. Simile tre bona rezulto estis je tiuj homoj, kiuj povis plene koncentriĝi je unu tasko.

Se homoj perceptas sian laboron kiel sencoplenan, trioje altiĝis la probablo, ke ili ne serĉos la novan laborpostenon. Tio korespondas kun antaŭaj esploroj, laŭ kiuj la senco de laboro estas pli grava ol la alteco de salajro. Kiam laborgvidantoj kaj dungoficistoj konatiĝis kun la rezultoj de la menciitaj studoj, ili konstatis, ke la samon ili longdaŭre observis ĉe siaj dungitoj. Sed je plua demando „Kiom da mono vi elspezas, por ke vi subtenu la kontenton de viaj dungitoj?“, ili plej ofte respondis, ke neniom. Kiel ni ekspliku tiun konflikton?

Plej ofta klarigo estis, ke pagi salajron estas laŭ ilia pritakso sufiĉa. Se ni volas, ke homoj simple faru sian laboron, tiam sufiĉas pagi ilin. Sed montriĝas, ke laborantaj homoj bezonas ion pli kaj se ili ricevas ion pli, tiam simple pliboniĝas la rezultoj de la firmaoj. Certe estas avantaĝe por firmaoj provi plenumi la dezirojn de siaj dungitoj, se oni ekscias ilin.

Specialistoj montras al gvidantoj de firmaoj kelkajn simplajn paŝojn – ekz. se homoj pli bone laboras, do ili havu eblon foriri pli frue el laborejo kaj dediĉu sian tempon al familioj. Plue, ke estroj foje skribu propramane dank-kartojn pro akiritaj rezultoj.

En multaj okazoj evidentiĝis modera pliboniĝo de la laborpotenco kaj rezulto, sed ankaŭ eminenta malpliigo de la nombro de akcidentoj, ĉar homoj estis pli koncentritaj je laboro. En multaj okazoj avantaĝis la aliro, ke estroj ne ordonu, kion fari, sed lasu homojn fari sian laboron kaj kaze de bonaj rezultoj aprezu ilin (ne nepre finance).

Tiuj ĉi esploroj enhavas unu gravan komunan trajton. Ŝajnas, ke ĉiu el ni havas siajn kapablojn, kiuj montriĝas nur kiam ni estas plene koncentritaj. Tiel estas grave, ke ni ne genuiĝu sub centoj da malgravaj aferoj. Montriĝo de ena kreemo kaj ena koncentriĝo forigas fizikajn malsanojn kaj malkontenton.

El la libro: *Io devis okazi (Nĉco se muselo stát)*, Novela Bohemica, 2014
Tradukis Lucie Karešová.

Avantaĝoj de fromaĝo kiel veturkunulo & Labirinto ĉe Hampton Court *Tri viroj en boato*

Jerome Klapka Jerome

Mi memoras pri amiko mia, kiu aĉetis du fromaĝojn en Liverpool. Bonegaj fromaĝoj ili estis, maturaj kaj molaj, kun ducentĉevalpovaodoro, pri kiu oni povus garantii, ke ĝi estas ankoraŭ forte flarebla je distanco de tri mejloj kaj faligas homon je distanco de du cent metroj. Mi estis tiam en Liverpool kaj mia amiko diris, ke se mi ne kontraŭas, li petos min kunporti ilin, kiam mi reiros al Londono, ĉar li mem reiros nur post kelkaj tagoj kaj li opiniis, ke ne estos bone konservi la fromaĝojn pli longe.

„Kun plezuro, kara knabo,” mi respondis, „kun plezuro“.

Mi vizitis lin kaj forportis ilin en fiakro. Ĉi tiu estis disfalema afero, trenata de tuŝgenua, spiromanka somnambulo, kiun la posedanto en momento de entuziasmo, dum interparolo, nomis ĉevalo. La fromaĝojn mi metis sur la supron, kaj ni trene ekiris kun rapideco, kiu estus honorinda al la plej rapida stratplatigilo iam fabrikita, kaj ĉio iris gaje kiel funebra sonorilo, ĝis ni ĉirkaŭiris la stratangulon. Tie la vento portis bloveton de la fromaĝoj sur nian ĉevalon. Tio lin vekis kaj kun spirblovo de teruro li ekkuregis po tri mejloj ĉiuhore. La vento ankoraŭ blovis en lia direkto kaj antaŭ ol ni atingis la stratfinon, li jam sin streĉis je rapideco de preskaŭ kvar mejloj ĉiuhore, tute postlasante la kriplulojn kaj korpulentajn maljunulinojn.

Por lin regi ĉe la stacidomo necesis du portistoj, krom la veturigisto, kaj mi opinias, ke ĉe tiam ili ne estus sukcesintaj, se unu el la viroj ne estus havinta sufiĉe da menspreteco por meti poŝtukon sur ĝian nazon kaj bruligis pecon de bruna papero.

Mi akiris mian bileton kaj marŝis fiere kun miaj fromaĝoj laŭlonge de la perono, dum la homoj ĉe ambaŭ flankoj respektoplene retiriĝis. La vagonaro estis plenplena de homoj, tiel ke mi devis eniri kupeon, kie jam estis sep aliaj homoj. Kolerema maljunulo kontraŭstaris, sed mi tamen eniris; mi metis miajn fromaĝojn sur la pakaĵtenujon, premsidiĝis kun afabla rideto kaj diris, ke estas varma tago. Pasis kelkaj momentoj kaj tiam la maljunulo faris movetojn.

„Tre preme ĉi tie,“ li diris.

„Eĉ premege,“ diris la viro apud li.

Tiam ili ambaŭ komencis flari, kaj ĉe la tria flaro ili ĝin ricevis rekte sur la bruston, leviĝis sen plua vorto kaj eliris. Tiam korpulenta maljunulino leviĝis kaj diris, ke estas hontinde, ke respektindan edziniĝintan virinon oni tiel turmentas, ŝi kolektis la valizon kaj ok pakaĵojn kaj foriris.

La restintaj kvar vojaĝantoj sidis ankoraŭ iom da tempo, ĝis solenaspekta viro en la angulo, kiu laŭ la vestaro kaj ĝenerala aspekto ŝajnis aparteni al la funebraĵistaro, diris, ke ĝi lin memorigas pri mortinta infaneto; la aliaj tri vojaĝantoj penis ĉiuj samtempe trapasi la pordon, ĉe kio ili sin ne malgrave dolorigis.

Mi ridetis al la nigra sinjoro kaj diris, ke mi opinias, ke ni restos solaj en la kupeo; li ridis gaje, kaj diris, ke iuj homoj tiel ekscitiĝas pri bagatelaĵo. Sed ankaŭ li fariĝis strange malgaja, post kiam ni ekiris, tial mi petis lin, kiam ni venis al Crewe, ke li venu trinki kun mi. Li konsentis kaj ni trabatis al ni vojon al la bufedo, kie ni kriegis kaj piedfrapadis kaj svingis la ombrelon dum kvarona horo; tiam junulino venis kaj demandis, ĉu ni deziras ion.

„Kion vi trinkos?“ mi diris, turnante min al mia amiko.

„Mi havos viskion por duonkrono, senakvan, mi petas, fraŭlino,“ li respondis.

Trinkinte ĝin li kviete foriris kaj eniris alian kupeon, kion mi konsideris malnobla.

De Crewe mi estis sola en la kupeo, kvankam la vagonaro estis plenega de homoj. Kiam ni haltis ĉe diversaj stacioj, la homoj, vidinte mian malplenan kupeon, ekkuregis al ĝi. „Jen, Maria; venu, multe da sidlokoj.“ „Bone, Tom; ni eniros ĉi tien,“ ili krias. Ili kuras antaŭen, portante pezajn pakaĵojn, kaj interbatalas ĉirkaŭ la pordo por eniri unuaj. Unu malfermas la pordon kaj supreniras la ŝtupojn kaj ŝanceliĝas malantaŭen en la brakojn de la viro post si; ili ĉiuj venas ekflari kaj poste duonsvene foriras kaj premas sin en aliajn kupeojn, aŭ pagas la prezdiferencon kaj veturas unuaklase.

El Euston mi portis la fromaĝojn al la domo de mia amiko. Kiam lia edzino eniris la ĉambron, ŝi ĉirkaŭflaris dum momento. Tiam ŝi diris: „Kio estas? Kaŝu nenion!“

Mi diris: „Estas la fromaĝoj! Tom aĉetis ilin en Liverpool kaj petis min kunporti ilin.“

Mi diris plie, ke mi esperas, ke ŝi komprenas, ke min la afero tute ne koncernas; ŝi diris, ke pri tio ŝi certas, sed ŝi parolos kun Tom, kiam li revenos.

Mia amiko devis resti en Liverpool pli longe ol li atendis; tri tagojn poste, ĉar li ankoraŭ ne revenis hejmen, lia edzino vizitis min. Ŝi diris: „Kion Tom diris pri tiuj fromaĝoj?“

Mi respondis, ke li ordonis, ke oni konservu ilin en malseketa loko kaj ke neniu tuŝu ilin.

Ŝi diris: „Ne estas verŝajne, ke iu volos tuŝi ilin. Ĉu li ne flaris ilin?“

Mi kredis, ke jes, kaj diris ankaŭ, ke li ŝajnis havi grandan korinklinon al ili.

„Ĉu vi opinias, ke li ĉagreniĝus,“ ŝi demandis, „se mi donus pundon al viro, por ke li ilin forportu kaj enterigu?“

Mi respondis, ke mi opinias, ke li neniam plu ridetus.

Venis en ŝian menson ideo. Ŝi diris: „Ĉu vi bonvolos konservi ilin por li? Permesu, ke mi ekspedu ilin al vi.“

„Sinjorino,“ mi respondis, „kio koncernas min, mi vere ŝatas odoron de fromaĝo, kaj la vojaĝon kun ili antaŭ kelkaj tagoj mi ĉiam rigardos kiel feliĉan finon de agrabla libertempo. Tamen en ĉi tiu mondo ankaŭ aliajn ni devas konsideri. La sinjorino, sub kies tegmento mi havas la honoron loĝi, estas vidvino, kaj mi ne scias pri la kontraŭo – eble ankaŭ orfino. Ŝi havas fortan, mi povas diri, elokventan malamon al tio, ke oni ŝin tiranu – kiel ŝi diras. La ĉeeston de la fromaĝoj de via edzo en ŝia domo, mi instinkte sentas, ŝi rigardus kiel tiranadon; neniam iu diru, ke mi tiranis vidvinon kaj orfinon.“

„Nu, bone,“ diris la edzino de mia amiko leviĝante, „mi diras nur, ke mi kunprenos la infanojn kaj loĝos en hotelo, ĝis tiuj fromaĝoj estos formanĝitaj. Mi kun ili ne vivos plu en la sama domo.“

Ŝi plenumis sian vorton kaj lasis la hejmon sub la gardo de la domlaboristino kiu, demandita ĉu la odoro ŝi povas toleri, respondis, „Kiun odoron?“ kaj kiu, kondukita tute proksimen al la fromaĝoj kaj ordonita ekflari forte, diris, ke ŝi povas rimarki malfortan odoron de melonoj. El tio oni konkludis, ke al ŝi la atmosfero ne multe malutilos, kaj oni lasis ŝin tie.

La hotela kalkulo sumiĝis je dek kvin gvineoj kaj mia amiko, ĉion enkalkulinte, trovis, ke la fromaĝoj kostis al li po ok ŝilingojn kaj ses pencojn por funto. Li diris, ke pecon da fromaĝo li tre ŝatas, sed ke liaj rimedoj ne permesas je tioma kosto; tial li decidis forigi ilin. Li ĵetis ilin en la kanalon; sed li devis fiŝkapti ilin, ĉar plendis la boatistoj. Ili diris, ke la odoro preskaŭ svenigis ilin. Post tio li kunportis ilin en malluma nokto kaj lasis ilin en la paroĥa kadavrejo. Sed la mortenketo ilin malkovris kaj faris grandan bruon.

Li diris, ke oni komplotas senigi lin de la vivrimedoj vekante la kadavrojn.

Mia amiko fine liberiĝis de ili, kiam li kunportis ilin al marborda urbo kaj enterigis ilin en la sablo. Pro tio la loko ricevis sufiĉe grandan reputacion. La vizitantoj diris, ke ili neniam antaŭe rimarkis, kiel forta estas tie la aero, kaj malfortbrustaj homoj kaj ftizuloj svarmadis tie poste dum multaj jaroj.

(-)

Harris demandis min, ĉu mi iam vizitis la labirinton ĉe Hampton Court. Li diris, ke li foje eniris por montri al iu la ĝustan vojon. Li mem ĝin elstudis pere de

vojplano kaj la afero estis tiel simpla, ke ĝi ŝajnis eĉ malsaĝa - apenaŭ valoris la du pensojn postulataj por la eniro. Harris diris, ke li kredas, ke oni elpensis tiun planon kiel ŝercmistifikon, ĉar ĝi tute ne similis la realaĵon kaj nur erarigis. Lia akompananto estis provinca kuzo. Li diris: „Ni eniru ĉi tien, nur por ke vi povu diri, ke vi eniris, tamen ĝi estas tre simpla. Estas ridinde ĝin nomi labirinto. Vi prenas ĉiam la unuan vojon dekstre. Ni promenos dek minutoj kaj poste foriros por lunĉo.“

Tuj post ilia eniro ilin renkontis kelkajn homojn, kiuj diris, ke ili estas tie jam de tri horkvaronoj kaj tio jam sufiĉis. Harris diris, ke ili povas sekvi lin, se ili volas; li nur eniros, poste turnos kaj eliros. Ili diris, ke tio estas afabla liaparte, ili postviciĝis kaj lin sekvis.

Ankaŭ diversajn aliajn homojn, kiuj deziris fari finon al la afero, ili kolektis dum la pluiro, ĝis ili grupigis ĉirkaŭ si ĉiujn homojn en la labirinto. Homoj, kiuj jam perdis ĉiujn esperojn, ke ili iam eliros, aŭ ke ili iam revidos siajn hejmon kaj amikojn, kuraĝiĝis ĉe la vido de Harris kaj lia bando kaj aliĝis al la procesio kaj lin benis. Harris diris, ke li kredas, ke entute lin sekvis ne malpli ol dudek homoj; virino kun brakinfano, kiu estis tie la tutan matenon, insiste petis, ke ŝi tenu lian brakon, por ke ŝi ne perdu lin.

Harris tiam turnis sin dekstren, sed la vojo ŝajnis longa kaj lia kuzo diris, ke li supozas, ke la labirinto estas tre granda.

„Ho, unu el la plej grandaj en Eŭropo,“ diris Harris.

„Jes, ĝi devas esti,“ respondis la kuzo, „ĉar ni jam marŝis pli ol du mejlojn. Eĉ Harris komencis pensi, ke tio estas iel rimarkinda, sed li daŭrigis, ĝis fine ili preterpasis duonon de unupenca kuketo kuŝanta sur la tero, pri kiu la kuzo de Harris ĵuris, ke li jam vidis ĝin tie antaŭ sep minutoj. Harris diris: „Ho, neeble!“, sed la virino kun la brakinfano diris; „Tute ne“, ĉar ĝin ŝi prenis mem de la infano kaj ĵetis tien, tuj antaŭ ol ŝi renkontiĝis kun Harris. Ŝi diris plie, ke ŝi bedaŭras, ke ŝi iam renkontiĝis kun Harris, kaj eldiris la opinion, ke li estas trompisto. Tio kolerigis Harris, li aperigis sian planon kaj klarigis sian teorion.

„La plano eble taŭgus sufiĉe bone,“ diris unu el la grupo, „se vi sciis, kie ni estas nun.“

Harris ne sciis kaj proponis, ke la plej bona farendajo estas, reiri al la enirejo kaj komenci denove. Komenci denove entuziasmigis neniun; tamen pri la utilo de la reiro al la enirejo estis senmanka unuanimeco, tial ili turnis sin kaj sin trenis refoje post Harris en la kontraŭa direkto. Pasis ankoraŭ dek kelk minutoj kaj ili trovis sin en la mezo.

La unua intenco de Harris estis preteksti, ke tion li celis, sed la homamaso aspektis minaca, kaj li decidis rigardi ĝin kiel maltrafon. Tamen ili nun havis definitivan ekirpunkton. Ili sciis kie ili estas, ankoraŭ unu fojon oni esploris la planon, la afero ŝajnis eĉ pli simpla ol antaŭe kaj ili ekiris la trian fojon. Post tri minutoj ili estis denove en la mezo. Post tio, neniun alian lokon ili povis trafi. Kien ajn ili direktis sin, ili revenis al la mezo. Tio fine fariĝis tiel regula, ke kelkaj homoj restis tie kaj atendis, ĝis la aliaj faris promenon kaj revenis. Post iom da tempo Harris reeligis la planon, sed la nura vido de tio kolerigis la homamason kaj ili ordonis, ke li iru frizi per ĝi la harojn. Harris diris, ke li ne

povis ne senti, ke ĝis certa grado li fariĝis nepopulara. Fine ili ĉiuj frezeziĝis kaj vokis per krioj la gardiston kaj la viro venis, grimpis la ŝtupetaron ekstere kaj kriis, kien ili iru. Sed jam ili ĉiuj tiel konfuziĝis, ke ili nenion povis kompreni kaj la viro ordonis al ili resti, kie ili estas, ĝis li alvenos. Ili kunpremiĝis tie kaj atendis; li grimpis malsupren kaj ekiris. Li estis, malfeliĉe, juna gardisto kaj nova en la metio; kiam li eniris, li ne povis trafi ilin kaj baldaŭ ankaŭ li perdiĝis. Jen kaj jen ili ekvidis lin ĉirkaŭkuranta ĉe la alia flanko de la kreskaĵbarilo, kaj foje li ekvidis ilin, kuris por atingi ilin kaj dum kvin minutoj ili atendis lin kaj tiam li reaperis denove en ĝuste la sama loko kaj demandis, kien ili estis irintaj.

Ili devis atendi, ĝis unu el la maljunaj gardistoj revenis de sia tagmanĝo antaŭ ol ili povis eliri.

Harris diris, ke li opinias ĝin tre bela labirinto, kiam li estas kompetentulo; ni interkonsentis, ke ni penos instigi Georgon eniri ĝin sur nia vojo returne.

El la libro *Tri viroj en boato (sen mencio pri la hundo)*
Tradukis G. Badash, redaktis kaj parte novtradukis Margaret Munrow.

For la viandon!

Paul de Lengyel

Dion mi benas pro tio, ke mi povis veni loĝi en ĉi tiun malgrandan, antaŭurban domon. Sole al la okazo mi dankas pri tio ĉi.

Foje mi tagmanĝis en malgranda sensignifa restoracio. Apud mi sidis maljuneta, bonvestita sinjoro, kiu, kiam mi sidiĝis, manĝis kukuman salaton kaj trempadis panopecetojn en ĝian vinagron, kvazaŭ ĝi estus viandgrasaĵa saŭco.

Mi regalis min per kariofilsupo, poste mi mendis unu porcion da ŝpinacaĵo, – poste ankoraŭ unu porcion da ŝpinacaĵo, kaj mi trinkis nur akvon ... kion fari? Mi ne havis sufiĉe da mono por tagmanĝi ian viandaĵon.

Tiam mi rimarkis, ke la „kukumsalatulo“ akompanas kun akra atento mian modestan manĝon. Kiam mi finis ĝin, li alparolis min: „Sinjoro, ĉu vi estas vegetmanĝisto?“

„Jes.“ (Kion diri? „Mi hontis konfesi al li mian malriĉecon.)

„Kial vi estas tia?“ (Eĉ se mi tia estus, mi ne povus argumenti.)

„Mi ne povas manĝi ion, kion oni ricevas nur per mortigo de vivanta estaĵo,“ mi diris subite, mallonge, sed konvenege.

„Brave, junulo! Kaj kial vi ne trinkas vinon?“

„Mi ne prenas tian trinkaĵon, kiu povas eksciti la homajn malbonajn kapricojn kaj ecojn.“

„Tre ĝuste. Vi estas bravulo. Kian profesion vi havas?“

„Mi estas oficisto de la urba depagofico.“

„Ĉu vi havas loĝejon?“

„Jes.“

„Ĉu vi ne deziras ĝin forlasi?“

„Kial vi demandas tion?“

„Ĉar en mia domo estas ankoraŭ unu loĝejo, kiu estas malkare luebla de bonmorala, sola junulo,“ respondis la maljuneta sinjoro.

„Kion vi komprenas per bonmorala? Apartan enirejon el la ŝtuparo?“

Li surprize rigardis min.

„Kredeble vi antaŭ nelonge fariĝis viandon-ne-manĝanto, alie vi ne parolus tiel ... Kion mi komprenus? Mia loĝanto estu vegetmanĝisto.“

„Ĉu vi estas tia?“

„Mi estas ĉiama honora prezidanto de l’ Societo de la Vegetmanĝistoj, kaj la plej energia apostolo de la vegetaĵanismo. Ĉu vi ne aŭdis ankoraŭ pri Tobias Müller?“

„Vi ... vi estas do Tobias Müller? Sinjoro, permesu al mi, ke mi levu mian rigardon kun la plej granda respekto sur viajn harojn blankiĝintajn en la kreskaĵmanĝado.“

„Levu ĝin. Nu, ĉu vi volas fariĝi kunloĝanto?“

„Sendube. Kiam mi povus iri?“

„Tuj.“

„Ni iru.“

„Kaj via apartenaĵaro? ...“

„Tio ne estas grava.“

Post duonhoro mi estis en la nova loĝejo.

Bela, agrabla domo, kun malgrandaj, sed puraj loĝejoj, en kiuj ekskluzive vegetaĵanoj loĝis. Mia ĉambro estis aminda, guste meblita; sur la muroj pendis portretoj de nekonataj homoj, – apostoloj de la viandon-nemanĝo, kiujn la viandon-manĝantaj barbaroj kuiris eble en oleo aŭ trempis en varmegan pecon. La ĉambro kostis ses florenojn ĉiumonate, kaj sekrete mi deziris, ke estus bone, se ĉiuj budapestaj dommastroj fariĝus vegetaĵanoj.

Ĉiuj kunloĝantoj akceptis min kiel fraton, kaj ni reciproke konsentis en ĉio, kiel la unuaj kristanoj en la jarcentoj de l’ persekuto. En la mateno de la sekvinta tago bela knabino portis al mi kakaon.

„Kiu sendas la kakaon?“ mi demandis de la knabino.

„La dommastro. Tio ĉi okazas ĉiutage, por ĉiu loĝanto.“

„Ĉu oni devas pagi por ĝi?“

„Ne.“

Bonege! Kredeble la nova religio tre baldaŭ disvastiĝos kaj la kakaofabrikistoj estos la plej riĉaj homoj de l’ mondo.

Ĝis nun mi pagis 30 florenojn ĉiumonate por loĝado, sekve la vegetaĵaniĝo pligrandigis je 24 florenoj mian salajron. Kion faros el tiu ĉi mono la junulo, kiu havas pli multajn ŝuldojn, ol li povus ilin elpigi kaj komenci la partumajn pagojn? Li plibonigos la sinnutron. Mi abonis tagmanĝon je 18 florenoj pomonate en urboflanka restoracieto, kaj tie mi manĝis tiom da viando, kvazaŭ leono.

Tamen, kiam mi renkontis Tobiason Müller, mi ruĝiĝis; ĉar la restoj de l’ konscienco ekzistas ankoraŭ neneigeble en mi. Akran rigardon li ĵetis al mi el siaj grizaj okuloj, sed nenion diris.

Mi sentis la neceson firmigi mian pozicion. Mi aĉetis por unu floreno lardon fumaĵitan, kaj mi portanta ĝin iris al sinjoro Müller:

„Sinjoro,“ mi diris. „Mia patro estas vilaĝano kaj la vegetaĵanismo senefike forflugas super li. Vane mi instigas lin, li ne sekvas min; li eĉ volas min eltiri, - jen li sendis al mi tiun ĉi lardon, kiun mi transdonas al vi, kiel signon de mia fideleco kaj firmeco.“

Larmoj aperis en la okuloj de Müller.

„Mi dankas, junulo. Ni kondamnos tiun ĉi lardon kvazaŭ rifuzindan malamikon. Solene ni bruligos ĝin.“

„Ne faru tion, Sinjoro Müller, ne reveku la dormantan leonon; pripensu nur: rostita lardo ... ha, mia Dio!“

Kaj mi eliretigis trifoje mian langon. Sinjoro Müller laŭte kalkulis la nombron de l'eliroj, poste li severe diris: „Aj, aj, junulo! Ŝajnas, ke en vi jam ekrevekiĝas la dormanta leono.“

Mi ekkaptis lian manon: „Sinjoro,“ mi diris senteme, „ne komparu min kun la plej terura viandon-manĝanta monstro. Veku en mi la kamelon, la bovon, la kapron, la kanguruon, sed lasu la leonon.“

„Bone, mi vidas, ke vi estas fervora samideano. Metu la lardon sur la tablon.“

Post tiu ĉi sceno dum pli longa tempo mi ne renkontis lin.

Unu fojon mi decidis, ke mi esploros la lignejon apartenantan al mia loĝejo. Brulantan kandelon mi prenis kaj iris en la kelon. Kiam mi senbrue trairis sur la mola fundo de l'malluma antaŭkelo: prezentu al vi, kion mi vidis tra la ligna kradaro de l'barilo? Sinjoro Müller sidis sur unu barelo kaj li bonhumore „lardumis“; li manĝis mian lardon.

„Bonan apetiton, sinjoro Müller!“ mi diris kviete kaj sidiĝis apud lin.

En la sekvinta minuto mi tranĉis pecon da lardo el la tutaĵo kaj komencis ĝin manĝi kun la plej natura mieno.

Sinjoro Müller rigidite de surprizo rigardis min dum unu momento, poste li rekonsciiĝis kaj diris: „Ki ... kion? Ĉu vi manĝas lardon?“

„Kompreneble! Ĝi estas ja vegetaĵlardo; alie vi ne manĝus ĝin.“

„Sendube, ĝi estas nerekte vegetaĵa manĝaĵo,“ respondis sinjoro Müller, per tono iom malpli severa.

„Kiel?“

„Ĉar ĝi estas farita el la viando de vegetmanĝanta besto.“

„Nu?“ mi demandis mirigite.

„De porko. Ĝi manĝas glanojn, branon, maizon, terpomojn kaj kukurbojn. Unuvorte: ĝi estas samideano.“

„Vere; forkalkulante la glanojn kaj la branon, ĉar tion ni ne manĝas.“

„Vi estas prava. Sciu, ke la progrespartianoj signife faciligis la dogmojn.“

„Vi estas do progrespartiano?“

„Jes,“ respondis sinjoro Müller neŝanceliĝante, „kaj tiujn bestojn, kiuj manĝas nur kreskaĵajn nutraĵojn, mi ne kunkalkulas kun viandomanĝaĵoj.“

Nun li subite rifuziĝan ekmovon faris per sia mano: „Eĥ, eksciu ĉion; mi fariĝis ekssektano.“

„Ha!“

„Nia prezidanto subite mortis kaŭze de apopleksio. Tiu ĉi cirkonstanco pruvas, ke la vegetaĵanismo ne asekuras kontraŭ apopleksio. Kaj, ĉar mi fariĝis vegetaĵano nur pro la timo de apopleksio, tial mi ekssamideaniĝas. Morgaŭ mi eĉ malfondos la domon. Vi pagos de la unua de l'venonta monato 25 florenojn por la loĝejo. Bonan tagon!“

La sekvintan tagon li sciigis la loĝantojn per cirkulero pri la ŝanĝo. Kaj la unuan de la sekvinta monato mi rekomencis tagmanĝi kariofilon kaj spinacaĵon; kaj mi tuj refariĝis vegetmanĝanto, kiam mi ĉesis esti vegetaĵano.

El la libro *Libro de l'humoraĵoj*

Birdoj

Jiří Karen

*Mi estas birdo
Birdo tre mallerta
Malsekigis min la pluvo
Scias mi troege
ke mia antaŭulo
saŭro estis.
Ankaŭ la birdo de mia koro
tre malcerte flugviĝas
Malfacilas velveturi
per forpinĉitaj flugiloj
Sed estinte unufoje
jam la birdo.
Mi volas kuraĝe stari
ĉeflanke de la kanto
kaj de la flugiloj.*



DANKOJ

En la ĉi-jara *Traduka printempo* partoprenis Jindřiška Drahotová, Lucie Karešová, Pavol Petrík kaj Tomáš Břicháček. Koran dankon al ĉiuj partoprenintoj.

Grandan dankon al Pavel Rak pro la belega enkonduka bildo de renkontiĝo en Venecio.

Ni dankas ankaŭ al Pavol Petrík kaj Markus Beyer pro lingvaj korektoj.



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Prago
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Odesílatel:

Klub esperantistů v Praze

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7